

Adam Mickiewicz,
Morto de kolonelo

tradukita de Manfred Retzlaff

En arbaro, ĉe dom' de forstisto,
Estis ar' de pafistoj staranta,
Ĉe la pord' kolonela gardisto,
En la dom' kolonelo mortanta.
Homoj el la vilĝoj kuniris,
Armeestron ĉi tiun konantaj,
Ties forton kaj gloron admiris,
Pri la sort' de ĉi tiu plorantaj.

Tiu sian ĉevalon seligis,
La ĉevalon tre riĉan je gloro,
En la domon ĝin enkondukigis,
Por ĝin vidi en sia mort-horo.
Ankaŭ la uniformon alporti
Li ordonis kaj sian pafaĵon,
Volis li kiel soldato ne morti,
Ne vidinte plu sian armaĵon.

La ĉevalo jam enkondukiĝis,
Kiam pastro la domon eniris,
Ĉiu hom' pro bedaŭro paliĝis,
Surgenue preĝ-vortojn ekdiris.
Eĉ maljunaj soldatoj plorantaj,
Kiu tiom da sango fluigis,
Senkompate aliajn plorigis,
Estis nun siajn manojn faldantaj.

Sonoriloj eksonis, matenis;
Estis la soldatar' jam irinta;
Homoj, vidi la korpon alvenis,
Tiun de l' kavaliro mortinta.
Kušis li sur la lito paŝtista,
Kun la kruc' en la manoj, kun selo
Sia, sia pafil' kaj mantelo,
En la verda vestaĵo pafista.

Tamen - kian knabinan vizaĝon
Tiu havis kaj kian jun-aĝon!
Estis tiu ĉi bela virino
Emilia Plater', heroino.²

...

²aŭ:
De l' nacia ribel' heroino.

*Traduko de la Pola poemo “Śmierć pułkownika” de ADAM MICKIEWICZ (Adamo Mickjeviĉo, *1789 – †1855) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-01-30.*

MR-080-3 / Arg-756-1519 (2013-01-04 16:24:54)

Mi, Manfred Retzlaff, tradukis tiun ĉi polan poemon kun la helpo de s-ino Elżbieta Klünder (14.03.1954 - 22.04.2002). Vidu ankaŭ: <http://www.ek-stiftung.de/Deutsch/Leben.html> .